

Eŭropa Bulteno

Aprilo 2016, Numero 159

ESTONTO DE ESPERANTO LIGE AL LA EVOLUANTAJ NACIISMOJ



La E-historio montis ke ni havis periodojn de granda kresko kaj periodojn de krizoj. La krizoj klare estis ĉiam kiam en landoj regis naciismoj kaj ŝovinismoj. Pensu nur pri la militaj tempoj kaj ŝovinismaj reĝimoj kiel la nazia kaj faŝista, sed ankaŭ la ekstremaj komunistaj reĝimoj, kiuj kutime ankaŭ estis ŝovinismaj. La grandaj disfloroj okazis post la grandaj militoj kiel post la unua kaj dua mondmilitoj – kiam homoj suferintaj pro militoj aspiris pri paco kaj abomenis naciismajn reĝimojn. En la tempoj de krizoj la Movado kutime enfermiĝis kaj la esperantistoj kaŝis sin, ne ĉesis esti esperantistoj, sed ne montis sin kaj ne aktivis, ĉar tio povis esti vivdanĝera. Ja ŝovinismo neniel korespondas kun la esperantismo kaj internacia solidaro. Nun ni troviĝas bedaŭrinde denove en la periodo kiam sendube fortiĝadas nehaltigeble la naci-ŝovinismaj reĝimoj kiuj kreskigas troigitajn memamojn de la popoloj kaj malamon kontraŭ iu alia (ĉu enmigrintoj, ĉu muzulmanoj, ĉu minoritatoj (kiel romaoj kaj aliaj), ĉu

najbaraj popoloj, ĉu sameseksemuloj kaj en tiun grupon oni enmetas ankaŭ la suspektindajn esperantistojn.

La tendenco estas tiel evidenta kaj forta, ke mi vere ege timas ke ĝin oni ne plu povos dissolvi per pacaj rimedoj kaj politika diplomatio. La eŭropaj idealoj pri solidareco, unueco en diverseco, maldiskriminacio kaj pacemo iom post iom malaperas kaj la homamasoj komencas ilin malestimi.



Por la E-movado en Eŭropo nun ni havas eĉ tre evidentan pruvon pri rekta rilato inter naciŝovinismo kaj kontraŭesperanta politika agado: en la naskiĝurbo de Zamenhof la novregantaj politikistoj decidis fermi la Kulturano Esperanto-Centron kiukaze iu tiea politikisto eĉ komparis Zamenhof kun Hitler. En Kroatio ĉi-jare la Kroatia E-ligo, kiu ĝis nun regule ricevadis subvenciojn por parta financado de la oficejo, perdis tiun financadon. Mi timas ke en danĝero ĉiam pli estas institucioj financataj de ŝtatoj kie ekregas ŝovinistoj. Kio atendas Vian E-muzeon se en

proksimaj elektoj de la ŝtatrezidanto de Aŭstrio venkos la kandidato de ekstrema naciisto? La esperantistoj sentas tion kaj komencas mem retiriĝi kaj enfermiĝi en la propran ŝelon. Se ekregos la ŝovinistaj partioj en grandaj landoj kia Francio kaj Germanio, kie jam la popolo fortigis ilin en la parlamentoj, la danĝero ne nur por esperantistoj sed ankaŭ por la mondo kreskos enorme. Fortiĝas la ekstremistaj partioj praktike en ĉiuj Eŭropaj landoj... La plej bona el la malbonoj kiuj povos nin baldaŭ trafi estas disfalo de EU.

Kion do ni faru? Mi ne havas saĝan rekomendon sed mi scias ke esperantistoj devos kaŝiĝi kaj ĉesi aktivadi en reĝimoj ekstremismaj. Kaj mi scias ke nun oni devus batali kaj engaĝiĝi kontraŭ tro naciistaj sistemoj, sed mi ankaŭ scias ke se ili venkos, tio ne estos bona por ni. Plej verŝajne iom da esperantistoj klopodos adaptiĝi al la novaj tendencoj (kiel klopodis esperantistoj en nazia Germanio, faŝista Italio...) kaj serĉi artekreitajn aspektojn de ligo kun la regantoj (ekz. ke Esperanto povus helpi al disvastigo de la reganta naciista ideologio aŭ ke ĝi estas bona por kunligi naciismojn de diversaj popoloj) kaj la plimulto klopodos plene kaŝi sian esperantistecon kaj negi ĝin.

Kiam dissolviĝos EEU, ĉar ĝiaj idealoj ka celoj neniel plu povos esti antaŭenigataj, vi scios ke venis la katastrofa historia fazo. Sed nun ankoraŭ ne venis tiu fazo kaj ni plu optimisme laboru.

Zlatko Tišljarić

STARTIS PROJEKTO DE EDUKADO.NET »NI EKPAROLU«

La 30an de aprilo okazis la unua konversacia sesio kiun ni organizis kadre de la nova projekto [Ekparolu!](#). Kiel ni jam anoncis, edukado.net laboras pri parigo de novaj lernantoj de Esperanto kun spertaj uzantoj de la lingvo. La genevoj (novuloj) estos helpataj pere de 10 paroligaj sesioj/lecionoj, kiujn volontule proponas al ili niaj membroj, la tiel nomataj geonkloj, kiuj partoprenis en trejnado por bone kaj efike fari sian paroligajn lecionojn.



En la unua grupo 17 geonkloj pretas okupiĝi pri la komencintoj. Komence ni povos akcepti ĉ. 15 genevojn, kiuj aŭ finis jam la arbon de Duolingo aŭ pere de aliaj lerniloj akiris la bazon de gramatikaj konoj kaj akiris relative bonan vortprovizon.

La interesiĝantoj devas peti aligon al la projekto, trapasi kelkajn testojn, kaj se ili estas je la ĝusta nivelo por konversacio, ili povas eniri la sistemon, vidi la agendon kaj la lecionofertojn de la geonkloj kaj fiksi rendevuojn. Eblas elekti konversacitemojn, sed ankaŭ liberaj parolsesioj povos okazi. En la estonto estos elŝuteblaj ankaŭ vortolistoj kaj helpiloj por la genevoj, kaj lecionskizoj pro la paroligaj geonkloj. Post ĉiu sesio la geonkloj raportas kaj donas skribajn konsilojn el la genevoj.

Jam kvar nevoj (po unu el Usono, Turkio, Francio kaj Rusio) trapasis la enirtestojn kaj povas libere elekti el la lecionoj, el kiuj dudeko da sesioj estas proponitaj en la unua semajna agendo de *Ekparolu!*. La programa surfaco de la projekto estos konstruita en la dua parto de la jaro, ĝis tiam Katalin Kovats kaj la geonkloj per multe da mana administrado provas funkciigi la sistemon kaj doni valorajn spertojn por la defintiva programo de *Ekparolu!*

Se vi volas labori kun ni kiel onklo aŭ onklino, aŭ konas komencinton, kiu meritas havi nian helpon, bonvolu kontakti la redaktoron.

Ni esprimu nian dankon al la geonkloj, kiuj donas valoran helpon kaj kuraĝigon al la komencintoj.

Katalin Kovats

KION FARI EN LA ZAMENHOF-JARO 2017?



Kiel ni scias, UNESCO proklamis Zamenhofon persono kiun la ŝtatoj rememoru kiel unu el la monde gravaj personecoj en la jaro 2017 okaze de 100-jariĝo de lia morto. Tio por la E-movado estas aparte konvena cirkonstanco por iom pli diskonigi Esperanton tra oficialaj kanaloj. Sed tion ne faros ŝtatoj mem, se ne venos iniciatoj de la landaj esperantistoj. Kroatia E-Ligo kontaktis jam en 2015 sian landan ENESCO-komisionon por demandi kiel KEL povas kunlabori kun la landa ENESCO-komisiono por realigi tiun celon

de UNESCO en 2017. Kaj UNESCO petis de KEL prezenti programon kiel prifesti kaj memori tiun daton, por ke ili povu decidi kiel ili kunlaboros en tiu programo. KEL faris ampleksan programon, kies centra elemento estas organizo de internacia konferenco je la temo: "Eŭropaj valoroj, homaj rajtoj kaj la moralaj konceptoj de Zamenhof". Tiu temo ampleksas kaj niajn interesojn kaj tiujn de EU (kio povas helpi por ricevi monhelpon de EU-instancoj) kaj la idealojn de UNO kaj UNESCO. UNESCO-komisiono promesis helpi kaj organize kaj eventuale ankaŭ finance. KEL atendas la finan respondon. Intertempe aperis plia ideo por igi la prifeston pli alloga por la publikaj medioj: KEL petos UNESCO-Komisionon inviti kaj financi la alvenos al la konferenco de iu el famaj UNICEF-ambasadoroj de Bona Volo. Inter ili troviĝas tre famaj personoj kiel ekz. Angelina Jolie. Se vere tia persono venus al nia aranĝo, certe pri tio raportus tre multaj informrimedoj neesperantistaj. Sed ankaŭ en ĉiu lando ekzistas iu tia ambasadoro, konata persono de tiu lando, kiun on verŝajne povas havi sufiĉe certe.

Pro tio mi proponis ke UEA dissendu iun alvokon al ĉiuj landaj asocioj organizi en la jaro 2017 iun internacian aranĝon laŭ iliaj kapabloj kaj intereso, kontaktu siajn landajn UNESCO-komisionojn kaj proponu al ili kunlabori kaj inviti iun el la famaj UNICEF-ambasadoroj por fari la feston vere impona.

Prezidanto de UEA, Mark Fettes, respondis al mi jena: »Koran dankon pro tiu propono kaj interesa iniciato. En nia kunsido antaŭ unu semajno ni diskutis pri la Zamenhof-Jaro, kaj viaj ideoj kongruas kun niaj. Ni laueble pretigos alvokon al la landaj asocioj en la proksimaj semajnoj.«

Zlatko Tišljarić

GRANDEGA MEDICINA OKLINGVA VORTARO KIE ESPERANTO ESTAS UNU EL LA OK LINGVOJ

En aprilo 2016 aperis *Oklingva medicina enciklopedia vortaro (Osmojeziĉni medicinski enciklopedijski rječnik)* de la aŭtoro Jozo Marević el Velika Gorica. La eldonisto estas Marka el Velika Gorica (Kroatio), kaj sur 3.200 paĝoj (21x30 cm) prezentitaj estas 50.000 vortoj, esprimoj kaj mallongigoj. La menciitaj ok lingvoj estas: la latina, kroata, angla, germana, franca, itala, hispana kaj Esperanto. Intervjuon kun nia samideano Marević por ĉi tiu paĝo faris D. Klobuĉar. Pli pri la afero vi povas legi en la portalo de Kroatia E-Ligo:

http://www.esperanto.hr/agado_oklingva.htm.



D.K.: S-ro Marević, la libro aperis en aprilo 2016, sed oficiale ĝi portas la eldonjaron 2015. Kiel tio?

J.M.: Tre bone vi tion rimarkis. Laborante pri ĉi materialo dum jaroj, mi antaŭvidis kaj firme decidis fini la laboron en 2015. Sed ĝis tiam ni ne trovis la necesan monon. Tamen, intence mi lasis la jaron 2015.

D.K. : Medicino ne estas via fako. Kial do vi decidis vortarumi ĝuste pri medicino?

J.M.: Mia fako estas la lingvoj germana kaj latina. Medicinon mi elektis ĉar laŭ mia opinio ĝi estas la plej humana el ĉiuj sciencoj. Kaj ĝi daŭre evoluos – dum ekzistas homoj, medicino ĉiam alfrontos novajn defiojn; ĉiam denove aperados iaj novaj virusoj, bakterioj kaj sekve ankaŭ novaj malsanoj kiuj en komenco ŝajnos nekuraceblaj.

D.K.: Diru al ni, mi petas, iom pri via vivo kaj kariero.

J.M.: Mi naskiĝis en 1940 apud Metković (suda Kroatio). Post baza lernejo en Opuzen kaj klasika gimnazio en Dubrovnik, mi diplomiĝis pri la germana lingvo kaj literaturo kaj pri la latina lingvo kaj literaturo en Filozofia Fakultato en Zadar. Mi laboris en lernejoj, kaj poste en la granda eldonista firmao *Školska knjiga*, kie mi longan tempon gvidis la socian-humanistikan sekcion. Mi estas membro de multaj asocioj, preleginto en multaj seminarioj kaj konferencoj, kaj aŭtoro de multaj fakaj libroj, artikoloj kaj sciencaj verkoj el pedagogio, historio kaj precipe klasika filologio. Ekz. mi organizis tri internaciajn sciencajn simpoziojn pri Bleiburg kaj la kroata „kruca vojo“ el 1945. Mi membras en Kroata-germana asocio en Zagreb kaj Germana-kroata asocio en Hamburg. El miaj sciencaj verkoj mi menciis *Sankta Paŭlo sur la insulo Mljet*, post kiam mi tradukis grandegan traktaton de Ignjat Djurdjević el la lingvoj latina, greka kaj itala sub la sama titolo (pri historia ŝippereo de sankta Paŭlo apud la kroata insulo, teksto en *Hrvatsko neretvanski zbornik*, 2009), kaj el miaj libroj mi nepre menciis *Kroatan-latinan enciklopedian vortaron* el 1977 (*Hrvatsko-latinski enciklopedijski rječnik*) kaj *Latinan-kroatan enciklopedian vortaron* el 2000 (*Latinsko-hrvatski enciklopedijski rječnik*), pro kiuj mi ricevis premiojn.

D.K.: Kia estas la strukturo de ĉi vortaro kaj kiel oni uzos ĝin?

J.M.: La ĉefan parton konsistigas la tuto el 50.000 leksikaj unuoj en la latina lingvo, en alfabeto ordo, kaj apud ĉiu unuo (vorto, sintagmo, mallongigo) troviĝas tradukoj al aliaj sep lingvoj, kun mallongaj klarigoj de signifoj, kie tio estis utila. Kiu konas la latinan, aŭ almenaŭ supozas kiel iu termino devus aspekti latine, tiu povas rekte traduki la deziritan terminon al aliaj 7 lingvoj. Kiu ne konas la latinan sufiĉe, tiu povas uzi la indeksojn en la lingvoj kroata, germana kaj angla, kiuj ankaŭ troviĝas en la sama libro. Tiel li/ŝi venos al la latina termino, kaj pere de ĝi al la aliaj lingvoj.

D.K.: Do, iun esperantan medicinan vorton ni ne povas traduki ekzemple al la germana lingvo ĉar ne ekzistas aparta esperanta indekso/suplemento?

J.M.: Se intereso aperos, oni povas iam el la uzitaj esperantaj terminoj krei esperanto-latinan suplementon. Ĝi estus aparta libro kiu akompanos ĉi tiun oklingvan vortaron, kaj trans la latina lingvo oni venos al tradukoj en aliaj 6 lingvoj. Same kiel pri Esperanto, ni povus diri ankaŭ pri la franca, itala kaj hispana lingvoj. Mi kredas, ke en ĉi momento la kroata, angla kaj germana indeksoj pli-malpli sufiĉas por ĉiuj praktikaj bezonoj.

D.K.: En la mondo estas granda nombro da plurlingvaj vortaroj, ankaŭ el la medicina fako, kion mi konstatis en interreto. Kaj mi aŭdis pri la angla-esperanta vortaro en 2001, kies aŭtoro estas la japano Saburo Yamazoe.

J.M.: Jes, estas konate, ke ekzistas plurlingvaj medicinaj vortaroj (ekz. ĉina-angla-franca-esperanta), sed kun tre limigita nombro da terminoj. Kaj la prilaboritaj terminoj estas ĉefe nur tiuj bazaj. Estas ankaŭ la seplingva vortaro de Kostić kun ĉ. 11 000 terminoj, kun tradukoj al la serba lingvo, sed sen iaj aldonaj klarigoj.

D.K.: Kiuj estas avantaĝoj de via vortaro, krom tio ke ĝi enhavas eĉ 8 lingvojn, inter kiuj estas – por ni karaj - lingvoj kroata kaj Esperanto?

J.M.: La vortaro havas 50.000 medicinajn kaj paramedicinajn unuojn, oni citas laŭbezone la grekan originalon, klarigoj estas donitaj kroatlingve. Laŭ ĉio tio, kaj laŭ ĝia amplekso oni vere povas diri, ke tio estas unika kaj la unua tiaspeca medicina vortaro en la mondo.

D.K.: Mi verkis iom da negrandaj libroj kaj tamen estis ege malfacile solvi ilian financadon, eldonadon kaj vendon. Kaj via libro havas 3.200 paĝojn, kosta 1.400 kunaĵojn (preskaŭ 200 eŭroj) kaj estas destinita al nur unu fako. Laŭ mia supozo, ĝi nepre devis esti financa katastrofo, ĉu?

J.M.: Ah, kion mi diru al vi? La urba estraro de Zagreb finance multe helpis, sed mi devis preni ankaŭ konsiderindan bankan krediton.

D.K.: Kaj kiom da tempo vi uzis por la verkado?! Cetere, kiel vi entute trovis ĉiujn ĉi terminojn kaj tradukojn?

J.M.: Mi studadis multajn antaŭajn vortarojn kaj tiel mi kunmetis ĉi tiun. Por la esperanta parto min tre efike helpis PIV. Mi taksas, ke la verkado daŭris pli ol 10 jarojn, kaj pli ol 12.000 laborhorojn. Ho, kiom ofte mi devis forlasi agrablan societon en kafejo pli frue ol mi ŝatis, nur por povi finlabori mian tiutagan kvanton da vortoj. Kiel mi diris en televida intervjuo por HTV-4 (la ŝtata televido, 26-an de aprilo 2016), ĉi tian laboron faras nur frenezuloj, kaj ne normalaj homoj...

D.K.: Esperanto - kial, de kiam? Kiuj viaj esperantaj agoj kaj spertoj estas por vi la plej gravaj?


J.M.: Esperanto allogis min jam dum servado en la „antaŭa“ (t.e. jugoslavia) armeo en 1962, ĉar mi, kiel multaj aliaj homoj, precipe tiuj junaj, alprenis esperantajn sanktajn ideojn kaj mesaĝojn. Poste mi finis ĉiujn kursojn kaj seminariojn en Primošten, partoprenis en multaj internaciaj esperantaj kunvenoj, ofte kun propraj verkoj. Hodiaŭ min pleje ĝenas la fakto, ke en nian esperantan movadon enpuŝas sin (psike) malsanaj homoj kiuj, volante nepre esti (vic)prezidantoj en esperantaj societoj, kaj estante nekapablaj eldiri almenaŭ unu frazon en Esperanto, iom post iom forpelas el la societo ĉiujn aliajn homojn. Mia opinio tio estas la plej granda kaŭzo de nesukceso en popularigo de nia movado.

D.K.: S-ro Marević, mi ne scias ĉu mi prefere deziru al vi multe da plia sukcesa laboro, aŭ multe da ripozo. Dankon pro la intervjuo!

J.M. Oni neniam haltu!

Davor Klobučar

JULES VERNE KAJ ESPERANTO



Estas bone rememorigi esperantistojn pri gravaj personoj kiuj subtenis E-on en la historio. Tial mi sugestas legi la imponan tri-ĉapitran studon de Abel Montagut pri Jules Verne kaj Esperanto:

https://mail.google.com/_scs/mail-static/_js/k=gmail.main.hr.LqlfA49fkD4.O/m=m_i,t,it/am=PiMeCZj_e38wrjEAaKUPVJj3_vPdk7Kzyz38e2cCROoVwP_N_h_A_8FetIUC/rt=h/d=1/rs=AHGWq9BDfavJIn-hCmmNw3OofT12AVazkQ aŭ artikolon de Istvan Ertl pri tio en La Ondo de Esperanto:
<http://sezonoj.ru/2013/02/220trezoro/>

Dario Rodriguez

INTERNACIA SCIENCA ESPERANTO-RUMANA KOLOKVO

Inter la 11-a kaj 12-a de novembro 2016 okazos en Timișoara, Rumanio la scienca kolokvo kies temo estas: ESPERANTO - PONTO INTER LINGVOJ KAJ KULTUROJ. Ĝin organizas Okcidenta Universitato de Timișoara .

Esperanto-Asocio de Rumanio, kunlabore kun la Okcidenta Universitato de Timișoara proponas, pere de tiu ĉi kolokvo, estigi komunikponton inter esploristoj kaj universitatanoj el diversaj landoj pere de lingvistika vehiklo – la lingvo Esperanto – sed ankaŭ krei malfermiĝon de nia lando al la monda Esperanto-agado. Estas invitataj partopreni la kolokvon universitatanoj, esploristoj, studentoj, ĉu esperantistoj, ĉu adeptoj de la lingvo, per prelegoj el siaj fakoj.



La laborlingvoj estos la rumana kaj Esperanto.

Scienca preparkomitato: Dorin Cosma, Prof. dr., Okcidenta Universitato, Timișoara Luminița Frențiu, Doc. dr., Okcidenta Universitato, Timișoara Sara Konnerth, Doc. dr., Universitato „Lucian Blaga”, Sibiu Mariana Pitar, Doc. dr., Okcidenta Universitato, Timișoara Stefan MacGill, vicprezidanto de UEA, Mireille Grosjean, prezidantino de ILEI, Aurora Bute, prezidantino de EAR.

Prezidanto de la kolokvo: Mariana Pitar

Organiza komitato: Aurora Bute, Luminița Frențiu „Florica Popa, Adriana Dolca, Asociația de Esperanto din România

Kalendaro:

Sendado de la resumoj: ĝis la 30-a de junio

Sendado de la resumoj en Power Point1 : ĝis la 15-a de septembro

Aliĝkoto (pagota surloke): eksterlandanoj - 50 eŭrojn, rumanoj - 180 leojn. La aliĝkoto inkluzivas: dokumentujon, 2 tagmanĝojn eldonotan volumon de la prelegoj.

La aliĝkoto ne inkluzivas la loĝadon, nek la vojaĝkotojn.

Interesitoj skribu al: a_bute@yahoo.com

Aurora Bute

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Pri la enhavo respondecas la aŭtoroj.

Finredaktita: la 30-an de aprilo 2016

Redaktoro: Zlatko Tišljarić

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljarić, Katalin Kovats, Davor Klobučar, Aurora Bude, Dario Rodriges.

Kontakto: ztisljarić@gmail.com

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

